

REVUE SPIRITE

Journal d'Études Psychologiques
Fondée par ALLAN KARDEC



ISK

INTERNACIA
SPIRITISMA
KONSILIO

DIO

Providenco
Saĝeco kaj
Harmonio

Selektitaj Artikoloj

Jaro 164 | N-o 04 | 2021

Ĉi tiu volumo enhavas iujn
artikolojn de la Spiritisma
Revuo de la jaro 164, #4
- Julio 2021. Ĝi ne estas
kompleta versio.

Tradukoj estas respondeco
de la tradukisto.



Revue Spirite
Journal d'Études
Psychologiques Fondée par
ALLAN KARDEC le 1er janvier
1858

Propriedade do Conselho
 Espírita Internacional (CEI)
 Logo et Marque Européenne
 enregistrée à l'**EUIPO** (Office de
 l'Union Européenne pour la
 propriété intellectuelle)

® **Trade mark 018291313**
 Marque française déposée à
 l'**INPI** (Institut National de la
 Propriété Intellectuelle) sur le
 numéro

® **093686835.**



ISSN 2184-8068

Depósito Legal 403263/15

© **copyright 2021**

Ano 164

Nº4

CEI | Trimestral | Julho 2021

Distribuição gratuita

Direção (CEI)

Jussara Korngold

Coordenação (FEP)

Vitor Mora Féria

Edição

Conselho Espírita Internacional

Coordenação e Montagem

Editorial

Helena Basílio

Tradução

Celio Freitas Martins

Givanildo Ramos Costa

Saulo Salgado Wanderley

revuespirite@cei-
 spiritistcouncil.com

www.cei-spiritistcouncil.com

ÍNDEKSO

Editorial	Jussara Korngold
Spiritismo kaj Scienco	Silvia Almeida
Spiritismo kaj Filozofio	Simão Pedro Lima
Spiritismo kaj Religio	Raul Teixeira Alessandro de Paula
Revizitante la Revuon	Samuel Nunes
Historia Plano	Thiago Barbosa da Silva
La Nova Generacio	Daniel Assisi
Konversacioj kun la Tombo	Spirito Natanael
Spiritismo kaj Societo	Jorge Camargo
Interviuo	Jorge Godinho
Spiritisma Socia Komunikado	Ismael Moura Costa André Siqueira



Jussara Korngold
Ĝenerala
sekretario CEI

ĈEFARTIKOLO

“Mi venas, kiel antaŭe, al la filoj de Izraelo, al tiuj el la vojo memdispelitaj, alporti al vi la veron kaj dispeli la mallumon. Aŭskultu min. Spiritismo, kiel mia vorto en la pasinteco, devas memori al nekredantoj, ke super ili regas la neŝanĝebla vero: la bona Dio, la granda Dio, kiu ĝermigas la plantojn kaj leviĝas la ondoj.”¹

Ni kredas ke neniam, kiel hodiaŭ, la Homaro bezonis tiom multe memori la vortojn, kiujn la Spirito de Vero portis al ni antaŭ 160 jarojn. La malfacilaj kolektivaj provoj de la nuna tempo invitas nin al pripensado, al renoviĝo tiel longe prokrastita, sed nun urĝa. Sufero ne estas celo, sed nur rimedo por vekti la animojn kiuj ankoraŭ ĝojiĝas pro resti nur en la mondo de iluzioj, malaprezantaj oportunecojn por kunporti al la lumo la diajn ecarojn kiu ekzistas en ni ĉiuj.

Tial la vero, kiu dispelas la mallumon, forigas la vualon, kiu tenas nin en

mallumo kaj malebligas al ni vidi la realon, kiu restadas antaŭ ni. Ĝi forigas la dubon, kiu pendas super la certeco pri la senmorteco de la animo. Komprenante la sopiron de niaj animoj serĉante feliĉon, Kardec demandis al la Spiritoj, kion ni bezonas por esti feliĉaj, kaj ili respondis ke "por la materiala vivo, estas nur la posedo de tio, kio estas necesa; por la morala vivo, estas trankvila konscienco kaj fido en la estonteco."²

Léon Denis, la granda apostolo de La Spiritismo, sin esprimis tiele dum la Spiritisma Kongreso de Lieĝo - Belgio (1905): "Spiritismo estas la radio de espero, kiu venas por lumigi nian malhelan universon, nian Teron inundatan kun sango kaj larmoj; ĝi estas la ĝoja radio, kiu venas por viziti la ĉambrojn de mizero, kiu penetras la malĝojajn hejmojn, kie loĝas mizero, kie sufero ĝemas."³

Povu ni, la gemalsukcesintoj de pluraj vivoj, fortigu nian fidon kaj fokusiĝu al tio, kio vere gravas, kovrante nin per kuraĝo, celante ke ni povu mensvidi, eĉ antaŭ la nuba ĉielo de niaj pensoj, la brilon de la tagiĝo kiu anoncas novajn tempojn, pli bonajn tempojn por la homaro.

Tradukita de Saulo Salgado Wanderley

¹ KARDEC, Allan, *La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉapitro 6, itemo 5.

² KARDEC, Allan, *La Libro de la Spiritoj*, Kvara Libro, ĉapitro 1, itemo 922.

³ Internacia Spiritisma Kongreso en Lieĝo, Belgio en 1905. [Traduko de Fabiana Rangel]. 2018. San-Paŭlo: AEC. (paĝ. 22)

SPIRITISMO KAJ RELIGIO

Neskuebla fido - La grandeco de Dio

José Raul Teixeira | Alessandro Vieira de Paula



Resumo

La homa penso pri Dio pliperfektigas, esprimante la moralan kaj psikan nivelon de la homaro, sed koncernis Jesuon prezenti Dion kiel Patron bonan kaj justan. Antaŭ la eraraj interpretadoj de la homoj, Spiritismo, restarigante la subliman koncepton pri la Nazaretana Majstro, ampleksigas nian komprenon pri Dio, koncernante, tiamaniere, al la spiritistoj, la faradon de la bono, tiel demonstrante sian intiman konekton kun la Kreinto.

Ŝlosil-vortoj: Dio, Jesuo, koncepto, spiritisma, konduto.

Tiel, estas klare, ke la Spiritisma Domo devas havi estraron, kiu pensas simile kaj estas strukturita per doktrinaj metodoj, kiujn sugestas la municipaj, regionaj, ŝtataj aŭ naciaj direktoj,

esperante, ke ĉi tiuj societoj baziĝu pri la penslinioj de Allan Kardec kaj Jesuo.

Estas klare, ke Spiritisma Domo, kie la estraro estas dividita en grupojn, kun diversaj doktrinaj idealoj, ĝi estos kondamnita al malsukceso, al disiĝo kaj

al obsedo, ofte kompromitante la kvaliton kaj la seriozecon de tio, kio estas oferdonita al la religia kerno (kiuj estas studoj, mediumaj kunvenoj, frata servo, manfluidaĵoj, ktp.).

Fronte al diverĝoj en la estraro, respekto kaj frata dialogo estas atendataj, kiuj favoros la maturiĝon de membroj kaj laboristoj, ebligante akiri konsenton kun fideleco rilate al la gvidlinioj de Spiritismo, sen personaj kredoj kaj vidpunktoj.

En ĉi tiu rezonado, en la sama parolado, pli poste, Allan Kardec asertas, ke: "La kuniĝo de pensoj kaj sentoj por bono estas, do, kondiĉo de unua bezono kaj ne eblas trovi ĝin en heterogena medio, kie mi aliras pli malaltajn pasiojn kiel fierecon, envion kaj ĵaluzon, kiuj ĉiam malkaŝiĝas per malbonvolemo kaj per lingva akreco, kiom ajn dika la vualo, per kiu oni provas kovri ilin. [...]". (Kardec, s.d., 196)

Allan Kardec ankaŭ asertas, ke la Societo estis formita cele al studo kaj esplorado.

Ĉi tiu noto ŝajnas evidenta, tamen ni rimarkis, ke la Spiritisma Movado ankoraŭ konsistas el multaj individuoj, kiuj ne ŝatas studi kaj eĉ ne legis la kvin verkojn de la pentateŭko de Kardec.

La manko de serioza studado estigas la aperon de ideoj kaj tezoj, kiuj ne estas subtenataj de la doktrinaj bazoj, kiuj ĉiuj kreskigas pliajn dividojn, diskutojn kaj riskojn, kio kompromitas la sanan kaj homogenan kreskon de grupoj kaj Spiritismaj Domoj.

Nuntempe estas inundo da tiel nomataj mediumaj verkoj, kies enhavo, flanke de ili, estas malbonkvalita kaj kun iuj

doktrinaj devojiĝoj.

Alia pensiga afero, kiu generas staton de vigleco, estas la kreskanta kaj troa aliro al memhelpaj temoj en prelegoj, studoj kaj libroj.

Kompreneble, la lecionoj pri memhelpo, kiuj baziĝas sur intima reformo kaj bonaj sentoj, estas bonvenaj, sed tio, kio maltrankviligas nin, estas la memhelpa eksceso, anstataŭ la studoj kaj doktrinaj pripensoj, cele al Allan Kardec kaj al akcesoraj spiritismaj verkoj, kun agnoskitaj kvalitoj kaj fidelecoj.

Oni rimarkas, ke dum ekzistas malpli da studoj pri Spiritismo, pli granda estas la manko de konoj en la Spiritisma Movado, kiuj sekve malfortiĝas, pli tendence al disiĝoj kaj kontraŭstaroj.

Krome, la troa memhelpo ne disvolvas en la spiritisto la profundan doktrinan rezonadon kaj la avidecon ĉiam pli studi, restigas lin, dum nedefinita tempo en la supraĵo de la informoj, pli tendence al la doktrinaj eraroj, kaj li plonĝadas en la neintereson pri la spiritisma studado.

Ni bezonas pli profunde relerni pere de la verkoj de Allan Kardec en studrondoj, prelegoj kaj kongresoj, kun taŭgaj temoj, sen zorgi pri la nombroj da personoj kaj pri financaj havigoj, celante la doktrinan kvaliton de tio, kio estas prezentata.

Ni estas en periodo, en kiu multaj spiritistoj preferas studadon, legadon kaj prelegojn pli supraĵajn, tiamaniere ke kelkaj el ili opinias, ke studi Kardec-n estas tre enuiga kaj ne alloga, kaj ankaŭ estas aliuloj kiuj preferas prelegojn, kiuj stimulas pli da rido ol reflektiĝoj.

Allan Kardec aldonas en sia parolado, ke la celo de la Pariza Societo de Spiritismaj Studoj estas ne nur la studoj pri la spiritisma scienco, sed ĝi devas iri pli longe, atingante ampleksige la moralajn konsekvencojn.

Tial oni rimarkas, ke la serioza kaj profunda studado de Spiritismo devas antaŭenigi la moralan plibonigon de la spiritisto, tiel ke ni devas esti bazitaj kaj en Jesuo kaj en Allan Kardec.

La spiritisto devas periode taksi sin, ĉu rilate al la akiritaj scioj, ĉu laŭ sia morala transformiĝo, starigante tion, kion Paŭlo el Tarso nomis "Bona Batalo". (Paŭlo, 2 Timoteo 4: 7-8)

Ju pli fragil-morala kaj intelekta, des pli senteme obsedite estas la spiritisto, fariĝos facila celo sub la influo de la malsuperaj spiritoj, kiuj, laŭ Allan Kardec asertas en sia parolado, kiuj ili promocios celante la malunuigon.

La neatenta spiritisto povas esti ilo de la obsedaj spiritoj en la Spiritisma Domo, kiuj klopodas krei aŭ fortigi la malkuniĝon, stimolante intrigojn, kverelojn, ofendiĝemojn, malordojn kaj disputojn, ĉio kompromitante la unuan punkton reliefigitan en ĉi tiu artikolo (metoda kaj unuforma direkto).

Multaj neofitoj aŭ pli spertaj kaj prudentaj laboristoj perceptas la disiĝon ĉe la Spiritisma Domo, kaj iuj elektas serĉi aliajn spiritismajn religiajn centrojn, kie ili povas trovi pli da ekvilibro, homogeneco kaj organizitaj taskoj, kiuj altiras la asistadon de la bonaj Spiritoj.

Kiam Spiritisma Domo ne plenumas adekvate kaj ekvilibre siajn aktivecojn,

la malunuiĝo kaj la devojiĝoj pro la nedeca okazanta moralo, ĝi tendencas ampleksiĝi per la rilatoj kun aliaj Spiritismaj Societoj, tiamaniere ke Allan Kardec menciis la rivalecon ekzistantan inter Spiritismaj grupoj.

Bedaŭrinde, en iuj urboj ni identigis la rivalecon aŭ mankon de unueco inter la Spiritismaj Domoj, kaŭzante evidentan damaĝon al la loka Spiritisma Movado.

Estas Spiritismaj Domoj, kiuj okazigas siajn doktrinajn eventojn kaj ne malkaŝas ilin en aliaj Spiritismaj grupoj; estas aliaj, kiuj starigas konkurson por vidi, kiu allogas pli multajn spektantojn; estas tiuj, kiuj eĉ ne scias pri la agadoj disvolvitaj en la aliaj Spiritismaj Centroj en sia loko.

La plej ekvilibrigaj gvidantoj devas agi por ĉesi la rivalecon aŭ distancigi ilin, ĉeestante en la Spiritismaj Societoj, sendante invitojn pri la eventoj kaj klopodante fari personajn kontaktojn por kunigi la ilojn de Frateco, kvankam ili ne sukcesas la celitajn rezultojn.

Allan Kardec klarigas, ke: "[...] la aliaj spiritismaj grupoj estas konsiderataj niaj fratinoj kaj ne konkurantoj" (Kardec, s.d., 201), do ankoraŭ multo estas farenda por ke la Spiritismaj Domoj kuniĝu kaj laboru laŭ la komuna idealo lumigi konsciencojn kaj konsoli afliktitajn kaj malkvietajn korojn.

Eblas, ke estas malgrandaj diferencoj inter la Spiritismaj Domoj, ne malplej ĉar neprobablas, ke unu estas identa al la alia, sed ke ĉi tiuj malsamaj punktoj ne koncernas decidajn aferojn de Spiritismo, kaj devas esti reciproka respekto, tiom multe ke Allan Kardec antaŭdiras ĉi tiun hipotezon kaj diras, ke

ili ne devas mordi aŭ ĵeti ŝtonojn unu al la alia.

Por fine, la ĉiekonata Kodiginto admonas, ke: “La celo de Spiritismo estas plibonigi tiujn, kiuj ĝin komprenas. Ni provu doni ekzemplon kaj montri, ke por ni doktrino ne estas sciigoj senanimaj. Unuvorte ni estu indaj je bonaj spiritoj, se ni volas, ke ili helpu nin”. (Kardec, sd, 202)

Dependas de la spiritisto fari profundan kaj kontinuan studon de la verkoj de Allan Kardec, kun la amplekso kaj defio de pli bona kompreno kaj vivado de la proponoj de Jesuo, por ke li estu la laboristo aŭ estro fidela al bonaj Spiritoj

en la Spiritisma Domo, strebante enplanti unuecon kaj samideanaron inter la samideanoj de tiu kerno kaj, sekve, antaŭenigi bonan konekzistadon kun la aliaj Spiritismaj Centroj, kvazaŭ ili estus ununura familio.


Ni serĉu en la “Spiritisma Revuo” la eksterordinarajn paroladojn de Allan Kardec, kiuj servas kiel veraj gvidlinioj por la spiritisto, kiu konsistigas la Spiritisman Movadon, por ke ĉi tiu movado, harmoniigita al la gvidlinioj de Jesuo, plenumu sian rolon plene adapti sin al la Spiritismo, kies lecionoj venis puraj tra la mensoj de sindonemaj Spiritoj kaj estis kodigitaj de la granda KARDEC.

Tradukisto: Givanildo Ramos Costa
Reviziisto: Célio Freitas Martins

KONVERSACIOJ KUN LA TOMBO

La Malobsedo kaj la Dia Kodo

Mesaĝo per la Spirito Natanael



(Psikofonia Mesaĝo ricevita de la mediumo Jacobson Sant'Ana Trovão, en mediuma privata kunsido de la Spiritisma Grupo Bezerra de Menezes, en la urbo Gojanjo, Brazilo)

Ke Jesuo konsolu niajn korojn!

Fratoj miaj, amikoj de nia animo, ni danku al nia Ĉiela Patro por permesi nin korekti la erarojn.

Dediĉu viajn horojn al la aktivecoj de la Bono.

Trovu taŭgan tempon por via lernado pri la materio Spiriteco.

Studu kun profundeco la Evangelion de Jesuo, nun interpretata de la Spiritisma Doktrino. Atentu pri tiu studo, ĉar ĉiu aktiveco postulas specialigon.

Ĉiu periodo de disvolvo de tasko postulas de la laboranto konsumon de forto adekvata al la rezulto, kiun oni celas. Se oni estas komencanto, por adaptiĝi kuranta servo, oni devos superi sinsekvajn etapojn per kontinua klopodo, kelkfoje persisti en ŝvitaj staĝoj por atingi la nivelon de tiuj, kiuj jam gradiĝis en siaj aktivecoj. Se oni estas veterano, oni devas daŭrigi kuraĝe, per daŭraj studoj, por kvalitiĝi antaŭ novaj defioj, laŭ la amplekso de la ricevataj respondecoj.

La mediuma grupo kiu celas malobsedon sekvas la saman vojon de progreso en la spirita flegado. La respondecoj pligrandiĝas, la postuloj ampleksiĝas, situacioj pli komplikaj disvolviĝas dum la longa tempo, postulante grandan dozon da dediĉo por helpi tiujn

submetitajn al akraj suferoj, subpremitaj de insistaj persekutoj aŭ envolvitaj en la iluzioj de la superregado de animoj.

Por zorgi kazojn tiajn, kaj la skipo de enkarniĝintoj kaj tiu de elkarniĝintoj bezonas plivastigi siajn studojn, perfektigi konojn, enprondigi en la afero, elirante el la supraĵo de simpla legado, serĉante la pli grandan senson de la lecionoj, kiujn la Spiritisma Doktrino portas al ni.

Specife, al la malobseda grupo estas postulate pli bonan konon de la Evangelio, ĉar malobsedi estas ŝanĝi la fokuson de la atento, estas neŭtraliĝi la ripetitan ideon, persistan, kelkfoje ruinigan, kiu forprenas la vivoforton de la estulo, kaj doni novan amplekson de percepto al la serioza menso. Kaj se tiel estas, nur la Evangelio de Jesuo donas kondiĉon por interrompi tiujn mensajn perturbojn.

Pardonu nin tiuj studistoj de la fizika kampo dediĉitaj al la perturbita menso, ni malvalorigas nenian psikologian lernejon kiu povas kontribui por la sano, sed, kiam la malsano devenas el psikaj perturbaj ligoj, nur la Evangelio kapablas oferi la bazojn por la intimaj ŝanĝoj kaj doni al la mensoj implikitaj en la malamo, novajn motivojn por plena sano.

Ekzistas tiuj, kiuj ankoraŭ kredas ke malobsedo estas forigo de influoj. Ne estas tiele. Ĉar oni ne sukcesas apartigi du korojn ligitajn al komunaj interesoj, precipe se tio okazas de antaŭ multe da tempo. Estas necese ke la du ŝanĝu la manieron pensi, por ke okazu samtempa liberigo.

Estas kazoj en kiuj momentaj forigoj eblas kaj ekaperas kiel kuracilo, por forigo de la kompromisoj, sed alvenas alvenas la tempo de la necesa renkonto por la emociaj ĝustigoj.

Eĉ en tiuj kazoj de obsedoj konsiderataj oportunistaj, de spontanaj persekutoj, kiel okazas al la dediĉaj laboristoj de la Bono, kiuj suferas la sieĝon de spiritoj elkarniĝintaj plenigitaj de envio, nur volante perturbi la etoson kaj tumultigi la vojon. Oni ne povas diri ke tio kio specife okazas devenas de hazardo, estas provoj necesaj, kiuj multe kontribuos por la progreso kaj de persekutitoj kaj de persekutantoj. Kaj ne malofte, kiam ili estas submetitaj al konscienca taksado, ni identigas en ambaŭ nevideblajn ligilojn en la nokto de la tempoj.

Se la insista obsedo ĉesas, por ke la animo spiru en nova espero, tio estas pro la evangeliaj nocioj, kiuj jam estis asimilitaj de la partoprenantoj de la obsedo. Kiam persekutito kaj persekutanto trovas la Evangelion, ili transformiĝas. En tiu ĝusta momento malaperas la obsedo.

Do fratoj kaj fratinoj, prenu la Evangelion ĉiutage, kaj studu ĝin por ke vi povu havi argumentojn sufiĉajn por la klarigo de la mensoj de tiuj, kiuj manifestiĝas en la mediumaj seancoj. Ĉi tie, oni ne volas ke la interparolanto nur parolu kun beleco, sed liaj vortoj estu envolvitaj en amaj vibradoj, kaj tiel tuŝu la animon de la manifestanto, helpante lin kompreni la lecionon.

Se al la ordinara psikologo oni postulas la plej diversajn teoriojn kaj lerneajn studojn de la menso kaj personeco, por la laboristo de malobsedo la studmanlibro estas la Evangelio.

Kompreneble oni ne lasas flanken “La Libro de la Spiritoj”, bazoj de la Dia Scienco, aŭ la granda manlibro pri praktikado, kiu estas “La Libro de la Mediumoj”, nek la kompendion de la revelacio de la spirita realaĵo, kiu estas “La Ĉielo kaj la Infero”, nek ni povas forgesi la libron, kiu rivelacias la teknikon de la movo de la animo en la spirita mondo, kiu estas “La Genezo”.

Ili kune konsistigas la necesajn konojn por la spiritisma laboristo, sed en la tasko malobseda estas eksponenciala la pozicio de la Evangelio, ĉar oni kuracas malsanajn animojn, konfuzajn mensojn, kaj la lertecon en la tekniko por rekonduki la malsanulojn al la sano kaj al la kompreno, oni akiras en la Evangelio de Jesuo.

“La Libro de la Mediumoj” esta instrumenta, la Evangelio esta substanca. Unu el ili ne povas elteniĝi sen la alia. Konsekru tiamaniere libertempon vian por la studo de la Dia Kodo de la Plej Granda Leĝo, portita de Jesuo. Vi konfirmos, ke viaj argumentoj en la dialogoj havos pli da klareco. Eĉ se viaj paroloj estos mallongaj, la efikeco estos evidenta. Tamen ni memoru ke neniu sukcesas paroli sufiĉe bone pri la Evangelio, se oni ne spertumas ĝiajn lecionojn.

Pardonu al ni la asertojn eble ŝajne diritajn per akretaj terminoj. Sed ni parolas al amikaj animoj en komuna laboro. Kaj tiu intimeco devenas el nia unuiĝo en Jesuo, kiu igas nin preterpasi la ekcesan formalajaĵon por paroli anstataŭe al viaj koroj.

Ni prenu tiel el la Evangelio, konata, spertumata kaj ekzempligata, la bazajn elementojn en ĉiu helpado al la suferantaj animoj, kiuj manifestiĝas en viaj seancoj de spirita interŝango.

Ke restu Jesuo subtenante nin kaj komfortante niajn korojn, en la daŭrigo de niaj taskoj.

Ke la paco restu ĉe ni.

Natanael

La spirita aŭtoro faras gravan atentigon pri la graveco de la Evangelio en la frata interparolo al la elkarniĝintoj, kiel la verko havanta enhavon por ĉia argumentado en la helpo al la suferantoj envolvitaj en la obsedaj procesoj. La Spirito, kiu prezentiĝas kun la nomo supra ne donis pli grandajn detalojn pri sia identeco.

SPIRITISMO KAJ SOCIETO

Spiritista Socia Agado em Meksiko

Jorge Camargo Zurita



Degree in Communication from the Universidad Autonoma de Mexico, with studies in political and crisis communication. He was President and founder of the Centro de Enseñanza Espirita Allan Kardec in Mexico City and of the Consejo Espirita de Mexico.



La karitato estas esprimo de kuniĝo de virtoj ke nur la praktiko de la amo permesas nin konstrui ĉe ni kaj materialigi helpon al la proksimulo, Allan Kardec emfazas en la principoj de la Spiritisma Doktrino.

Jesuo starigas ĝin kiel premison de iu ajn rilato kun la alia, identigante la amon kiel la bazon, kiu devas inspiri kaj gvidi nian manieron pensi, agi kaj eĉ paroli.

Ni, spiritistoj, praktikante nian intiman renovigon, surbaze de tiuj tri agmanieroj, ni komprenos la sublimecon de la Karitato kaj kreskigos ĝin ĉe ni.

Estas tiamaniere ke la spiritistoj, kiuj apartenas al la Spiritisma Konsilio de Meksiko (COEM), ne povante ignori la socian disvolvon, en kiu progresas siaj

materiaj spertumoj reenkarniĝaj, atestas la karitatajn agojn kiel instrumenton por instigi la transformigon de la socio, helpante la personojn malpli helpitajn, kiuj estas en vundebla kondiĉo.

"COEM" stimulas la federaciojn kaj la spiritismajn aliĝintaj centrojn, krei areon komunan en siaj strukturoj, kiuj faras, organizas kaj metas en praktikon sociajn aktivecojn direktitajn al la regionoj plej suferantaj el la komunumoj, en kie ili havas siajn hejmojn.

Unu el la celoj de tiuj ĉi orientigoj, estas ke ĉiu spiritisma centro fariĝu centra nukleo de sia komunumo, iu "bona najbaro", rekonata de ĉiuj pro ama interrilato, frata, kun sia pordo ĉiam malfermita.

Meksiko havas teritorion disan kaj antikvan spiritisman praktikadon, kiu devenas de la finoj de la 19-a jarcento, kiam estis kreita la unua Spiritisma Meksika Federacio, kie la libro "La Evangelio laŭ Spiritismo" estis tradukita el la franca lingvo, kaj en la unua jardeko de la 20-a jarcento, Meksiko havis unu Prezidenton de Respubliko, kiu estis spiritisto, Francisco I. Madero.

Hodiaŭ, la spiritismaj institucioj jam havas ligojn kun pluraj grupoj, kiuj kuniĝas por realigi sociajn taskojn kaj materialigi la karitaton, kiun Kardec kaj Jesuo incitas nin fari. Hejmoj por maljunuloj, orfejoj kaj malliberejoj estas regule asistitaj de la spiritismaj laboristoj, pere de donacaĵoj vestaj kaj nutraĵoj, realigoj de diversaj taskoj kiel la subtenado de higieno por malsanuloj kaj siaj instalaĵoj (en la kazo de la hejmoj de maljunuloj kaj orfejoj), en la akompano de prizonuloj kaj realigo de prelegoj pri la Doktrino kaj Evangelio. En siaj sociaj laboroj, la grupoj trovas, kelkfoje regulojn, kiuj ne permesas spiritajn aŭ religiajn konversaciojn, sed tio ne estas obstaklo al la realigo de la socia laboro.

Ĉiu regiono de la lando estas privata. Estas kazoj de nesezurecoj kaj perforto kiuj ŝanĝas la staton, frate.

La aktivecoj, kiuj pli permesas la kontakton kun personoj ne bone asistitaj estas la karavanoj, kiuj iras al la lokoj tre malriĉaj de la komunumoj, vilaĝoj, aŭ kvartaloj ene de la urboj. Pere de ĉi tiuj karavanoj, nutraĵoj kaj vestaĵoj estas donacataj al personoj, kiuj vivas surstrate, kaj kun kiuj estas eble havi rilatojn pli liberajn,

permesantajn disvastigi la Spiritisman Doktrinion, kaj portantajn la mesaĝon konsolantan de la Evangelio.

En aliaj urboj, por helpi tiujn kiuj spertumis tre grandan perforton, spiritismaj grupoj aliĝas al aliaj organizaĵoj por oferi psikologian terapion, kaj disvastigi la Doktrinion de la Spiritoj al la familianoj de malaperintaj personoj aŭ murditaj.

Meksiko estas granda lando kaj "COEM, dividiĝas tra kvar regionoj, kiuj havas siajn specifajn kunordigojn, kiuj apogas la spiritismajn grupojn.

En la Sudoriento estas indiĝenaj komunumoj aŭ vilaĝoj originaj, kiuj estas spiritismaj, kien direktiĝas karavanoj portantaj librojn kaj helpantaj la starigon de studaj metodoj.

En la Nodoriento estas Ŝtatoj pli popolhavaj, karakterizataj pro esti irvojo de migrantoj al Usono, en situacio de granda malfortika sanstato kaj danĝero.

Ni citu kelkajn ekzemplojn, kiuj feliĉigas (orgojlas) nin.

La Grupo de la Spiritismaj Studoj de Monterrey agadas en regionoj limaj, apogante migrantojn kaj aliajn grupojn suferantajn, oferante socian apogon kaj spiritan, krom apogi malriĉan regionon; alia ekzemplo estas la Spiritisma Federacio de Tamaulipas kaj Huastecas, la plej granda el la tuta lando, kiu inkludas grupojn, hejmojn kaj centrojn spiritismajn, ekde la limo kun Usono ĝis la sudo de la lando. Ĝia spiritisma kampanjo "Servi al Dio, Servi al la proksimulo" baziĝas en la edukado kaj pretigo de la spiritismaj laboristoj, adoltoj, adoleskantoj kaj infanoj por la socia

spiritisma servo, klarigante ilin pri la empatio rilate al la materiaj necesaĵoj kaj spiritaj de la proksimulo. La emfazo estas metita en la realigon de frataj renkontoj kaj spiritismaj prelegoj kaj pri la Evangelio en Hejmoj por maljunuloj, kaj vizitoj al hospitaloj por apogi la malsanulojn kaj siajn familianojn.

Krom la helpo al tiuj, kiuj necesas socian asistadon spiritisman, ĝi

ankaŭ havas la celon prepari la laboristojn por atentigi ilin spertumi de proksime la necesojn de la proksimulo.

La intima renovigo ne povas esti solida, se ĝi ne estas konstruita por la servo al la aliuloj.

Tradukisto: Givanildo Ramos Costa
Reviziisto: Célio Freitas Martins



COMISSÃO EXECUTIVA DO CEI
TRIÊNIO DE 2019 - 2022

Conselho Espírita Internacional

Eduardo dos Santos
Área Administração
da Casa Espírita
Uruguai



Manuel de la Cruz
2ª Tesouraria
Cuba



Hélio Blume
1ª Tesouraria
Brasil



Vítor Mora Féria
2º Secretário
Portugal



Jussara Korngold
Secretária - Geral do CEI
Estados Unidos da Améri-



Fátima Guimarães
Área Estudo e Prática
da Mediunidade
Brasil



Manuel Sonyer
1º Secretário
Espanha



Silvana Elia
Área Infância
Juventude e Família
Suíça



Marcial Barros
Área de Comunicação
Social Espírita
Portugal



Richard Buono
Área Atendimento
Espiritual
França



Walter Velásquez
Área Assistência e
Promoção Social Espírita
El Salvador





Social Media

[Facebook](#)

[Instagram](#)

[Youtube](#)

Online

<https://cei-spiritistcouncil.com>

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com

